

- N.º 20 S-ro. Carlos Martínez; Estación Plaza de Armas, Sevilla.  
» 21 » Patricio Llano; Baracaldo (Bilbao).  
» 22 » Urbano Gómez; Cuesta de las Cadenas, 1, bajo, Santander.  
» 23 » P. Tarnow; Galkhansen, b 1, Langenfeld (Alemania).  
» 24 » Salvador Pérez; Oficial de Correos, Reina, 45, Madrid.  
» 25 Grupo «Nova Sento»; Wad-Ras, 195, Barcelona.  
» 26 S-ro. José Perogordo; Santos, 2, Madrid.  
» 27 » Pelayo Moreno Ferrer; Pontejos, 1, Madrid.  
» 28 » James Leakey; Hatfield (Herts), Inglaterra.  
» 29 » Luis Florez; Kapitano de la 16.ª Reg. de Artillerio. Segovia.  
» 30 F-ino Mario Franco; Valverde, 8, Madrid.  
» 31 D-ro. Carlos M. Cortez; Serrano, 53, Madrid.  
» 32 S-ro. Teodosio de la Cruz; Serrano, 53, Madrid.  
» 33 » Carlos Bosch; Kolonelo de l'Regimiento Valencia, Santander.  
» 34 » Eusebio Solano; Kuracisto, Puebla de Guzmán (Huelva).  
» 35 » Benito Anguiano; Nacia Intruisto, La Línea (Cádiz).  
» 36 » Eduardo Moreno; Oficisto, Torneo, 53, Sevilla.  
» 37 » Eduardo Arroyo; Kuracisto, Jaén.

HISPANA  
ESPERANTO-BIBLIOTEKO  
HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ K. C.

EL MODERNA  
HISPANA PARNASO  
TRADUKITA  
DE  
JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1'15 Fr. sv.  
(TRI RESPONDKUPONOJ)

ADRESO:  
GLORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID  
HISPANUJO

2326

HISPANA  
ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare se eble dekdu librojn, ĉiu 32 paĝa almenaŭ, 13½ × 19½ cm., pri literaturo, historio, folkloro, k. t. p., de Hispanujo, kaj eble fremdan tekston, «Postrikolto» de Grabowski. Abonanto tuj ricevos jam ses aperintajn verkojn, kies aparta prezo por ne abonantoj preskaŭ sumas abonprezon; ĉi tio konstatas malkarecon de la abono. Belaj ilustritaĵoj, muzikaĵoj por fortepiano, sur luksa papero. Krom tio la Biblioteko lotos belegan ORAN MEDALON de la VI Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido po ĉiu cento da abonantoj kaj du binditajn kolektojn (1917-1922) de «Hispana Esperantisto».

Ĉiu samideano, sendinte DEK kotizojn el DEK abonantoj varbitaj kune, fakte estos konsiderata abonanto rajtanta la loton.

Abono, abonigu kaj propagandu la Bibliotekon; petu specimemon konvinkigite sendante tri respondkuponojn.

ABONO  
(DEKDU KAJEROJ)

Fremduloj: 7 sv. fr. aŭ egalvaloro en Hispana mon.

Samlandanoj: 7 pesetoj.

Aĉetu jenajn verkojn de la sama aŭtoro:

HISPANA GRAMATIKO PRI ESPERANTO, tre simpla, kompleta kaj malgranda lernolibro por hispanlingvanoj: *Unu* peseto.

HELENTA TEMARO POR LERNIGI RAPIDE ESPERANTON, kiun oni povas uzi en ĉiuj landoj, ĉar ĝi estas tute en esperanto, kvazaŭ enciklopedio, unu el plej bonaj kaj kompletaj lernolibroj laŭ «Heroldo de Esperanto», k. c.: 0,75 sv. fr.

AVILA kun: historia kaj arta priskriboj, biografioj de S.<sup>a</sup> Tereso de Jesuo kaj de la fama episkopo Alonso de Madrigal, 30 belaj bildoj sur luksa papero. 64 paĝoj: *Unu* sv. fr.

FERDINANDO VI KAJ FARINELLI, historia novelo proze kaj verse verkita, alloga teskto meritinta bonan prijuĝon de la recenzintoj; kun 32 paĝoj sur luksa papero: 0,70 sv. fr.

PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ POPOLKANTARO DE MURCIA, kun: muzikaĵoj, bildoj, 51 paĝoj, luksa papero. «Heraldo de Esperanto» de la 19 de novembro diras: «eble estas ĝusta esprimo nomi ĝin tre alloga prelego»...: *Unu* sv. fr.

Tuj aperos KORNELIINO novelo el bonekzemplaj de la tutmondfama aŭtoro de KIŬOTO, Miguel de Cervantes.

Grupoj kaj Asocioj devas aĉeti la kolekton de «HISPANA ESPERANTISTO (1917-1922) kiu formas luksan belegan volumon kun interesateksto kaj multnombraj ilustritaĵoj pri hispanaj arkitekturaj: 20 sv. fr., por fremduloj, 25 pesetoj, por enlandanoj kaj amerikanoj.



Federación Española de Esperanto  
Hispana Esperanto - Federacio

HISPANA  
ESPERANTO-BIBLIOTEKO

Rodríguez San Pedro 13 - 3.<sup>a</sup> - 7, E-28015 MADRID  
Tel. 1334 (11) - 4468079

HISTORIO - ARTO - LITERATURO - TRADICIO - BELAJ NATURAĴOJ K. C.

EL MODERNA  
HISPANA PARNASO

TRADUKITA

DE

JULIO MANGADA ROSENÖRN

PREZO: 1'15 Fr. sv.  
(TRI RESPONDKUPONOJ)

ADRESO:

GRORIETA DE BILBAO, 5. — MADRID

HISPANUJO

### AL RAFAEL DE SAN MILLÁN

Vi estis talenta kuracisto, klera «Cervantisto», mirinda poeto de la kastila kaj esperanta lingvoj; vi estis kavaliro el tre nobela deveno kaj riĉulo, kaj tamen vi estis modesta, humila, sindonema, bonkorega, perfekte demokrata, vidante reala nobelaro aŭ aristokrataro la sciularon; vi estis fidelela disĉiplo de la Majstro, vera kaj firma *internatdeulo*. Mi volas, do, honori vin per la sekvantaj miaj tradukitaĵoj, aperigante unue originalajn versaĵojn kiujn mi verkis, kiam Morto forrabis vin al ni.

### SONETO

Jam mortis Rafael de San Millán,  
Poeto nobla plena je l'inspir',  
Talenta grandanima kavaler'!  
Per plumo esprimadis lia man'  
La sentojn, kiuj fluis de fontan'  
Tre milda, de la koro; lia dir'  
Alloga ĉiam estis, kaj dezir'  
Bonkora kontraŭ ĉia la tiran'...  
Li estis inda je plej bona sort',  
Ĉar estis tre sindona lia sent'  
Al ĉio kaj al ĉiuj; eĉ la fort'  
De tia sento estis fundament'  
Por lia la konduto ĝis la mort':  
Nek estis por malbon' al li moment'.

De lingv' Esperanto per belo  
Vi verkis; mirinde kantinte  
Laŭ versoj tre plenaj je helo  
Verkitaĵ de kvazaŭ anĝelo  
Al tero memvole veninte.  
Ni iris Kongresojn; ĝojante  
Sur sama la vojo al celo;  
Ni ĉiam laboris, konstante,  
Ĝis Morto vin tiris—triumfante,  
Por nia bedaŭr'—el terŝelo.

Dumvive, animaj suferoj  
Ne trafis estingi la flamon  
Ĉe via la brusto, nek amon  
La vian sufoki mizeroj.  
Vi havis animan balzamon  
Ĉe l'mezo de teraj inferoj,  
«La Kantojn al Belaj Esperoj!»,  
Kaj certe vi havos la famon  
Ĉar ema vi estis al Verej  
Kaj ĉiam vi celis Fratamon.



"San de Mojo de 1808". — Goya. Muzeo de Prado.  
 (Pajmorligado de la Monteto Principe Pio. Madrid-farita de napoliona soldataro) Ni forigu la militon

MANUEL DEL PALACIO (†)  
 LA MILITO  
 SONETO

Forkuras taglum'. Dum helo la lasta,  
 Pendanta la brid' de l'brusto vundita,  
 Trairas ceval' izola, perdita,  
 Tra la batalkamp', dezerta kaj vasta.

Kovrite de ŝvito, sango, kot' pasta,  
 Kun brava rigard' kaj aŭd' akriĝita,  
 Esploras herbejon brut' dolorita  
 De jusa mortĝemo en ĝin elasta.

Ĝi haltas. Plennaze kaj sen deteno  
 Aeron ĉevalo nobla inspiras;  
 —La korvoj alflugas al la festeno.

Funebra sunfajro fine foriras —,  
 Reblovas ĝi, movas herbojn kun peno,  
 Heroan la frunton lekas, mortspiras!

ROSARIO DE ACUÑA (†)  
 SONETO

(Si verkis ĝin kiel epitaŝon por la tombo de sia patrino.)

Jam kun vi, kara patrino, mi estas;  
 Malsaman vojon dumvive ni iris,  
 Lacigo kaj la dolor' nin fintriris  
 En mortan dormon; jen, kune ni restas.

Pro l' amo nia jam ĉiam kunestas  
 La mensoj niaj; laŭ ili sopiris,  
 Laŭ branĉoj, kiel la fluoj, deiris  
 De sola trunko, aŭ font! Mi atestas:

Patrino kara, neniam vekigu!  
 Kaj ĉu pro l'fortoj superaj kaj diaj  
 Konscia mi' el neni' renaskigu,  
 Kaj unuigu destinoj la niaj,  
 Ni sekvu saman la vojon, kuniĝu  
 Ni ambaŭ, portu min brakoj la viaj.




Sevilla. Monumento al Becquer ĉe l'Parko de Maria Luisa.

## GUSTAVO ADOLFO BECQUER (†)

### RIMOJ


Rependigos de sur via balkono  
Sian neston malhela hirundin',  
Kaj denove, per flugil'sur vitraĵon,  
Ludante vokos vin;  
Kiu flugon malakcelis, ve!, antaŭ  
Via belo kaj mia la feliĉo;  
Tiu, kiu lernis nomojn la niajn,  
Ne venos... jam en nin!




Sevilla. Korto de privata domo.

Murojn de l'ĝardeno via rampos  
Foliplena kaj densa lonicer',  
Eĉ malfermos siajn florojn pli belajn  
Je l'fino de l'vesper';  
Tiu plena je tremanta la roso,  
Por ni kvazaŭ la larmoj de l'sufer'  
Kiujn vidis ni falantaj, taglarmoj,  
Ne rampos... For esper!

Jes, denove viaj aŭdoj aŭskultos  
 Kiel ardajn parolojn diras am';  
 Ĉe la via koro, eble, naskiĝos  
 Denove iu flam';  
 Vin mi mute, en 'ekstaz', surgenuen,  
 Kiel Dion, adoris ĉe l'altar';  
 Kiel amo mia por vi, ne dubu,  
 Neniu... brulos jam!



Sevilla. La Giralda plej  
 bela kaj gracia turo de la  
 Mondo.




Ĉarma anguleto de Sevilla.  
 Placo S. Cruz.

## JOSÉ MARÍA GABRIEL Y GALÁN (†)

### MIA BOVPAŬTISTO

Kun knabeto, mia bovpaŭtisto,  
 mi pasigis nokton ĉe l'montar'.  
 La knabeto sian mantelaĉon  
 por la du etendis ĉe la val',  
 —bonulet'!—li celi kapkusenon  
 volis al mi per la sia jak!  
 Je belega nokto de junio,  
 kiara nokt'junia ĉe l'kampar'!...  
 La valoj dormadas,  
 de la strig'kantad',  
 kaj son' de sonorilo,  
 de l'bovin' remaĉ'...;  
 prezidante puran atmosferon,  
 amantega de la lun' la klar'  
 sendis sian helon al ĉieloj  
 tre serenaj kun tutplena ĉarm'.  
 Ha, noktoj kaj horoj!  
 De l'ventet' blovad'!  
 Por fariĝi oraj la animoj!  
 Por fariĝi korpoj kiel ŝtal'!  
 Sed la knabo tre izole vivis!  
 Ha, de l'kor' kompat',  
 ĉar ĉe l'kampoj estis tre izola  
 lia la restad',  
 dum noktoj juniaj,  
 ĉe l'silent', heleco kaj hazard',  
 dum malsekaj noktoj de oktobro,  
 kiam branĉojn movas uragan';  
 dum la noktoj nigraj kaj kruelaj,  
 ve, de februar',  
 kun lupoj, rabbirdoj,  
 kun la vent' kaj akv'!...  
 Lin dormantan povus la bovinoj



*Novaj geedzoj elirante el preĵejo.  
El la lando de Gabriel y Galán  
(Salamanca)*

...vundi per hufbat',  
kaj liajn la lipojn  
aranesovaĝ';  
mortigi lin lupoj,  
kaj lin mangi agl'!...  
Ha, mia knabeto!

Kara estis al vi mia pan'!  
Havis mi malgrandan la infanon  
—fil' por mia rav',

kiun nur mi lasis se patrino  
ja lin gardis vikle kaj kun am'!...—  
se donus tiulo

ajojn al li kaj kun tia ŝpar'!...

sed, ha, li gepatrojn ankaŭ havas,

kion diros miaj amoj jam,

ĉar estas bonuloj

la patrín' kaj patr'?

Mi pasigis kun li belan nokton,

kaj de l'konscienco la minac'

parolis severe

al mi pro la fakt'...

Kaj mi jesis esti tre kruela...

Kaj naskiĝis ĉe mi pentofar'.

La knabo dormadis

milde al ĉielo la vizag';

kaj lumo de l'luno,

kiel patnjo, kisis lin kun plaĉ'.

kaj buŝo la mia

donis al li kison, kvazaŭ patr'!

Kaj mi diris al li kareseme

kiam venis eklumiĝ' de l'tag':

—Atentu, vekigu,

mia kara knab',

tag' alvenas, faru ni la fajron

kaj manĝaĵon... Vi starigu jam!

Vi poste restados

apud la brutar';

kaj je l'nokto ĉion vi forlasu...

ĉar Sanktulo estos la gardant'...  
Kaj vi diru al patrino via  
iru ĉe mi. Ha,  
junulo vi estas,  
de nun por vi estos alta pag'!


ANTONIO TRUEBA (†)

BENITA ARBO


Sidas de dek jarcentoj,  
ombren, sub arbo,  
nia la libereco  
kara, ĉe l' valo.  
Tiun, kiu la sanktan  
arbon ofendu,  
vundu; Dio kaj homoj  
tuje malbenu!

KONTRASTO

L' *Ibajzabal* ne havas,  
ĉe l'bordoj siaj,  
rozon, kiel la rozoj  
de vangoj viaj.  
En la montoj ne staras  
granita roko,  
kiel via staranta  
de l'kor' ĉe l'loko.




*L'Ibajzabal ĉe Amorebieta.  
Apud Bilbao.*



*L'Ibajzabal ĉe Amorebieta.*


ONDOJ EL LARMOJ

Ĉe l' *Ibarrangelua*  
verdaj la montoj,  
kie bruas eterne  
maraj la ondoj,  
kantas frenezulino  
ke la mar' estas  
ŝia tomb' familia,  
tiel ŝi plendas:  
— Larmojn tiel trinkadas  
mar' de l' Kantabroj,  
ke ondaro la ĝia  
ŝajnas el larmoj!




*Mezepoka Kastelo de Butron apud. Bilbao. (Vaska lando.)*






*Videjo el Granada kun la Alhambra.*

JOSÉ ZORRILLA (†)  
ORIENTAĴO




Tra la valo galopadas  
al la pordoj de Granado  
kvardek maŭroj proksimume,  
kies estro, kapitano,  
alvenante ĉe la pordoj  
haltigas sian ĉevalon,  
diras al virino, kiu



ploras sur la liaj brakoj:  
«Viŝu ploron, kristanino,  
ne turmentu min la larmoj!  
Havas mi Edenon novan  
por vi, mia la Sultanjo,  
en Granad' por vi mi havas


*Alhambra. Pordoj de l'Vino kaj de la Justeco.*

belan artan la palacon  
kun ĝardenoj kaj kun floroj  
kaj el oro la fontano  
kun akvsprucigiloj nombraj,  
kaj ĉe la *Genil'* a valo,  
inter mil, reganta estos  
mia griza fortikajo  
entenante vian belon.




*Alhambra. Enirejo al korto de la leonoj.*

Sur ĉi tiu la kamparo  
mia povo regas nure.  
Saman, kia mia parko,  
nek Kordob', Seviljo, havas:  
tie, la malnova palmo,  
foli plena la figujo,  
la florruga granatarbo,  
kune kun aliaj multaj,




*Alhambra. Kolonaro de la korto de la leonoj.*

kovras valojn kaj altanojn;  
tie, la nuksarb' maljuna,  
flava la hindfigkreskaĵo,  
kreskas ĉirkaŭ la kastelo;  
al ĉielo la branĉaron  
levas ulmoj de l'aleo;  
en arĝentaj oraj kaĝoj  
havas mi kantantajn birdojn.



*Alhambra. Salono de la litoj.*

Estu mia vi Sultanjo;  
ĉe l'Haremo sen virinoj  
aŭdas mi nenian kanton,  
tie regas la solecon,  
ĉar dezertaj estas ĉambroj.  
Orientajn la parfumojn  
la velurojn kaj vualojn  
grekajn mi tuj al vi donos,  
eĉ la *Kaĉemirojn* ŝalojn;  
mi donacos blankajn plumojn  
al vi por la fruntornamo,  
ĉar la via frunto estas  
blanka pli ol estas ŝaŭmo  
de la maroj orientaj;  
belajn perlojn por hararo;



*Alhambra. Ĝardenoj.*

kontraŭ varmo, luksbanejon;  
por la kol' la koliaron;  
kaj al viaj lipoj donos  
mia koro... firman amon!»

Energie ŝi respondas:  
«Via ĉio kian gravon  
havas por mi ĉar vi ŝtelas  
al mi miajn la gepatrojn  
la parencojn kaj amikojn?  
Lasu min libera, maŭro,  
ke mi povu tuj reveni  
al la mia hejmolando,  
ĉar Leon'aj miaj turoj  
pli valoras ol Granado.»

Maŭro ŝin aŭskultis pace,  
dum tuŝetis sian barbon,  
diris li, laŭ li meditis  
dume glitis larm'en vangon:  
«Se pli bonaj ol la maŭraj  
estas via ĝardenaro,  
ĝiaj floroj, la kasteloj,  
ĉe la via Leonlando,  
kaj al iu kavaliro  
vi promesis vian amon,  
ne plu vi, diino, ploru!  
Iru vi al via lando,  
iru vi al via gento!»  
Donis al ŝi la ĉevalon  
kaj duonon el eskorto  
la ĝentila kapitano;  
sin turnante kaj silente  
li ekiris en Granadon.



*Galicia. Rimarkinda anguleto ĉe la vilaĝeto Simes. (Pontevedra)*

ROSALIA DE CASTRO (†)

MORINJA (1)

*Ventetoj, ventetoj mildaj,  
ventetoj de mia tero,  
ventetoj, ventetoj dolĉaj,  
mia portu al naskiĝejo.*

Mi povas en ĝi nur vivi,  
kaj havi en ĝi kontenton,  
ĉar kien ajn mi aliras  
ĉirkaŭas min ombra denso.

Min kovras la densa nuboj  
graveda je la danĝero,  
graveda je la izolo,  
por mia la viv' veneno.

Ventetoj, ventetoj portu  
min kiel sekfolieton,  
ĉar vere sekigis min  
la varma potenca febro.

Se baldaŭ ne portus min  
ventetoj de mia tero,  
ventetoj se min ne portus,  
ne konus min eĉ parenco,  
ĉar febro konsumas korpon  
konstante kaj sen akcelo,  
kaj ankaŭ animon mangas  
samtempe la korpon febro.

Mi kiel ĉerizo ruĝa  
aspektis alian tempon,  
hodiaŭ flavega kiel  
preĝejaj vaksokandeloj,  
ĉar ŝajnis, ke oni suĉis  
la sangon el miaj vejnoj,  
kaj, kiel en vintro rozo,  
tutsame jen mia velko,

(1) Intensa landnostalgio.

mi bruna fariĝas plene,  
mi sentas de l' forto pardon,  
mi kiel maŭrin' bruniĝas  
el maŭra malbona gento.


Min portu ventetoj tien  
ĉar vivas en febratendo  
patrino, plorante ĉiam;  
la patr', ne havante perojn;  
frateto, por kiu donus  
mi koron, animsubtenon;  
kaj ŝi, l' amatin', al kiu  
mi faris la korpromeson.

Se baldaŭ vi min ne portus,  
mi mortus, vel, pro l' ĉagreno  
izole en fremda lando  
kaj de l' malestim' ĉe l' mezo,  
kaj kie min konsideras  
tutajo kun fremda senco.

Ve, mia bovino ruĝa!  
Ve, mia humila hejmo!  
Blekanta ŝafid' ĉe l' monto,  
pepanta birdar' ĉe l' bedo!  
Junuloj en danc' saltantaj,  
bruado de l' kastanjetoj,  
pluĉadado de mantamburoj  
*ksas-ko-ras-ĉas* de l' konkeroj,  
tamburo de tamburisto  
kaj fluto de niaj festoj,  
ne gojos mi vin aŭdante  
gojigan la *muŭnefron!*

Se kiel la bird' mi estus  
kaj havus flugrapidecon,  
rapide mi, do, jam flugus  
freneze pro la kontento,  
por kanti tegiĝan kanton  
ĉe l' kampoj de mia tero!

Nun tial ekfortflugadus  
mi kiel la sag' tra l' vento



*Galicia. Ĉarma loko apud la fervojo meze de grandioza pejzaĝo.*

sen timo pro l' noktaj ombroj  
kaj spite de la malhelo.

Kaj spite de vent' aŭ pluvo  
kaj spite de pluv' aŭ vento,  
mi flugus, flugadus ĉiam  
ĝis kiam mi trafus hejmon.

Sed mi ne similas birdo,  
kaj mortos mi pro l' korpremo,  
ĉu jam mi fariĝos larmoj,  
aŭ de la sopiro, pecoj!


Galiciaj ventetoj mildaj,  
forŝovas vi la ĉagrenojn,  
kaj amas tre vi l' arbaron  
ensorĉas eĉ vi riverojn;  
muziko en niaj valoj  
de l' kanoj de l' maizejoj;  
tre gajaj kunuloj miaj,  
ĝojbruo de ĉiuj festoj;  
min portu flugiloj viaj  
jam kiel sekfolieton.

Ke mortu mi en ĝi faru  
de mia la land' ventetoj;  
ĉar pensas mi ke, mortinte,  
avida je ĝi mi estos.

Ventetoj; ventetoj, ankaŭ  
mi pensas: ke tra l' tombejo,  
en kiu restaĵoj miaj  
por ĉiam, eterne, restos,  
tuŝante foliojn sekajn,  
vi pasos dum noktsilento,  
kaj inter kranoj blanka,  
bruigos vi kun timemo.

Ankoraŭ post mia morto,  
de mia la land' ventetoj  
mi diros al vi: "min portu,  
ventetoj, al naskiĝejo!"

*Muiñeira—muiñeira—tipaj kanto, muziko kaj danco, la ĉefaj.*



Galicia. Pontferrada.

## ADIAŬ NASKIĜLOKO

*Font', river', akvoŝluetoj,  
adiaŭon mi ekkrias,  
por cetero tute same!  
Ĉu revido? Mi ne scias!*

Mia lando, mia lando,  
naskiĝejo delikata,  
karaj la fruktogardeno  
kaj figuj' de mi plantata;  
kampoj kaj river', aleoj;  
pinoj, kiujn movas vento;  
ĉiam pepantemaj birdoj;  
hejmo por mi la kontento;  
muelej' ĉe l'kaŝtaniujoj  
klaraj noktoj sub lunbriloj;  
de l'preĝej' de mia loko  
retintantaj sonoriloj.

Rubusujon, kies fruktojn  
al ŝi koro donis iam,  
kaj la maizevojetojn,  
adiaŭas mi por ĉiam.

Feliĉejoj, ĝoj', adiaŭ!  
Naskiĝhejmon mi forlasas  
kaj konatan la vilaĝon;  
al alia mond' mi pasas!


For amikoj, jen fremduloj;  
for la valo, jen la maro;  
for bonamataj fine...

Por forlas' se venus baro!...

Mi, malriĉa, pekis fojon;  
estas mia ter' ne mia,  
ĉar eĉ pruntedonas vojon  
la riĉulo ambicia...

Ni ne rajtas havi ĝojon!

Nepre mi foriri devas;  
fruktogardenoj koramataj,



*Galicia. Portiko de la ĉielo. Katedralo de Santiago. Mirinda arkitektura ĉefverko.*

hejmofajro, kiu krevas;  
arboj, ve, de mi plantataj;  
Font', kabano!... Mi malrevas!..

Mi foriras de ĉi tie,  
herboj de l'tombejo nia,  
kiujn mi tre kisis, kie  
mortriprozas patro mia.  
Naskiĝlok', adiaŭ pie!

Virgulin', alvenis horo,  
blanka vi, laŭ ĉefangelo,  
vin mi portas en la koro,  
petu Dion de l'ĉielo  
ne mortigu min doloro.

Malproksimen jam mi aŭdas  
sonorilojn de la loko;  
sed por mi, ve!, malfeliĉa,  
ne aŭdiĝos plu alvoko;  
jam aŭdiĝas de pli longe...

Estas sonorad' ĉagreno...  
Mi vojiras tute sola...  
Sed... adiaŭ terbieno!

Kaj adiaŭ amatino!...  
eble por ĉiam mi diras  
de la bordo de la maro  
dum mi ploras kaj sopiras!

Ne forgesu min, Karulnjo,  
se foresto min frakasas  
preter la vastega maro...  
Hejmon, amon... mi forlasas!

JOSE MARIA ALVAREZ DE SOTOMAYOR

LA LIGNAJISTO

Juĝisto, bonvolu

al mi senkulpigi la malgentilajojn  
senpripensajn; sed atentu, mi ne havas  
ian ajn kulturon, la parolkapablon  
por ĉi tiuj gravaj aĵoj. Sed la vero,  
kiam oni volas diri ĝin, la baron



do ne trovas; ĉar, eĉ kvankam malĝentile,  
puŝas unu la alian, laŭ okazo.  
Tute vere, jes, permeson mi ne petis,  
kaj mi, dum la nokt', eniris en la kampon,  
arbaron irante,  
hakante la branĉojn.  
Sed miaj junfiloj  
— vi konu kialon —  
laciĝitaj de la petoj endormiĝis  
plenmalsataj... Dum la nokto, tiun tagon,  
mi de l' mem arbaro povis aŭskultadi  
nombrajn muzikinstrumentojn: la gitarojn,  
la metalplatmuzikilojn, kastanjetojn  
kaj manocimbalojn.  
Estis tiu nokto de la granda ĝojo,  
ĉar estis *Kristnasko*  
Kaj tiam mi pensis...  
je tiu festtago,  
ja rajtis la filoj  
ne dormi sen manĝo.  
Kaj prenis mi ŝnuron...  
Ĝin, por min mortigi, tenis mia mano!  
Mi, montojn irante,  
forlasis vilaĝon,  
pensdirante al mi mem, dum mi grimpadis  
senlace krutajojn:  
Gardist' se min trovus,  
ne sentus malpacon,  
kaj eble li dirus:  
«Vi haku lignaĵojn,  
kaj, jen, fumu cizaredon dum ripozo,  
bonfaran monkvanton  
vi prenu, tuj finu,  
kuniklejon eĉ difektu ne hazardo!»  
Ĉu vi min aŭskultas? Ĉar al la kunikloj,  
sciu, eĉ neniam mankas la nutraĵo,  
kiu mankas al la malriĉuloj ofte,  
tamen tion... ne disdonas al ni mastroj!

Certe, ke mi faris, sed ne tiel grandan,  
kiel oni diris, el branĉaro faskon.  
Estis ĝi ne granda, kiel oni diris:  
vi konstatu miajn fortojn, multajn jarojn,  
kaj konsciu, do, ke kvankam mi posedu  
tre grandan malsaĝon,  
tre kurbigi dorson pro malgranda pezo  
devigas blankharoj.  
Sed ankaŭ, nun sciu  
alian novaĵon:  
Al vilaĝ' mi venis, kiam sur la vojo  
mastro min renkontis. Kia malbonŝanco!  
Nigrigis malmulta  
mia sang' restinta pli ol estas karbo!  
Diris li kolere ĉe la voj', apude:  
«La lignaĵoj estas miaj. Lasu ŝarĝon!»  
Mi tion ekfaris;  
sed tiam, sur vangojn  
miajn sentis mi, min pinĉi miaj filoj  
kaj dirante: «Patr', alportu vespermanĝon!»  
Vualigis mia vido, dentoj grincis,  
aĵo stranga frenezigis mian kapon,  
mi diris: Nu, morto,  
aŭ atingi ĉe l' vilaĝo vendi faskon!  
Dume, apud la kampmastro jen gardisto,  
kaj sciu: hakanto  
ĉi tiu jam estis,  
kunul', kamarado!  
Subiris rapide  
kaj kiel la knaboj  
mi, malgraŭ faletoj,  
portante la ŝarĝon,  
ĝis kiam en kurbo  
traniĉita ĉe l' rando,  
mi falis de l' supra  
kiel la rulanta ŝtono, kun la fasko,  
en fundon terure.  
Kaj mi savis mian vivon..., ĉar la ŝarĝo,

kiu falis suben de mi, min akceptis!  
Vi, multfoje..., sciu, punas malbonajn,  
vi faras ĉi tion,  
kaj Dio la malon!

Antaŭ sonoriloj batis vesperpreĝon,  
mi trafis vilaĝon,  
po unu peseto  
mi vendis la faskon.

Mi eniris hejmen, ŝlosis forte pordon,  
aĉetinte la manĝaĵon kaj la panon;  
mi kaj miaj filoj mangis ĉe malhelo  
ĉion, kion al mi donis vendejmastro.

Se juĝisto estus antaŭ ol juĝisto  
lignajist' malriĉa, kaj, la saman tagon,  
kuŝiĝus la filoj

havante nek panon,  
multaj en karcer' nenial, do, restadus;  
kaj aliajn, male, vidus ni post kradoj.

Vi pardonu tion, kion mi parolis,  
ĉar mi fidel estas, sen facila lango  
por esprimi dirojn. Tion mi, do, diris,  
eĉ rediros, kaj neniu ĝin kondamnos.

Jen mia kulpego...,  
vi konas la rabon...,  
komprenu vi bone,  
konscie, la fakton...  
Kaj nunc..., la ŝnuro...

Ĉu la ŝnur? Sinjoro!... Mi ne ĝin elkaŝos  
kvankam estu ĝi pruvil' mi ĝin bezonas  
mi ne ĝin prezentas, donu la kondamnon!

Nur havas mi tion,  
ĝin, solan havaĵon  
kaj kamlaborilon;  
la peron, la savon

ĵus liberiginte, tuj per ĝi mi trovos...,  
reĥaki branĉaron...,

aŭ por min pendigi, per ĝi, aranĝinte  
mortigan la laĉon!

## HISPANA ESPERANTO-ASOCIO

(H. E. A.)

Se vi estas fervora hispana esperantisto deziranta akceli triumfon de Esperanto en nia lando, vi tuj nepre aliĝu: al H. E. A. pagante la ĵarkotizon—DU PESETOJN—; al la loka Grupo kaj al la regiona Organizo, abonante la gazeton «La Suno Hispana»—kvar pesetojn, Mar, 23, Valencia —; sed se viaj monrimedoj permesas al vi iun alian elspezon, atentu bone, ke

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

(Boulevard du Théâtre, 12. Genève. Svisujo.) estas gravega internacia Organizo, kiu sukcese laboras por la triumfo de Esperanto en ĉiuj rondoj de la nuntempa vivo, kaj ke vi devas aliĝi al ĝi pagante KVIN svisajn frankojn, kaj U. E. A. liveros al vi jarlibron kun adresaro de Deleĝitoj en nombregaj urboj de la tuta mondo, pretaj fari al vi ĉiajn servojn pri komerco, turismo, k. c. Por hispanoj la kotizo estas 6 ptoj.

Listo el abonantoj.

- N.º 1 S-ro. Julio Mangada Rosenörn.  
» 2 » Luís Mangada Sanz.  
» 3 » Emilio González Linera; San Lucas, 5, Madrid.  
» 4 » Pastro Mariano Mojado; Abascal, 13, Madrid.  
» 5 » Francisco Máñez; San Francisco, 4, Ceste (Valencia).  
» 6 » Manuel Maynar; San Juan, 4, Zaragoza.  
» 7 » Manuel Maynar; San Juan, 4, Zaragoza.  
» 8 » Manuel Maynar, San Juan, 4, Zaragoza.  
» 9 » Carlos J. Ruiz Crespo, Director Escuela Graduada; Ortigosa de Cameros (Logroño).  
» 10 » Roberto Maraury; Gran Vía, 24, Bilbao.  
» 11 » Hipólito S. Luengo; Reina Victoria, 31, Orense.  
» 12 » Fernando Redondo; Santa Cruz de la Palma.  
» 13 » Isidoro Díaz; Soledad, 23, Tocina (Sevilla).  
» 14 » Antonio Marmol; Centro, 8, Villanueva de las Minas (Sevilla).  
» 15 » David Martín; Castelló, 3, Madrid.  
» 16 » Venancio Girao; Vista Alegre, 5, Santander.  
» 17 » Teodoro Elizondo; Torre, 2, Bilbao.  
» 18 » Luis de Otaola; Aurrecoechea, 4, Bilbao.  
» 19 » Vicente Alonso; Sánchez Bustillo, 3, Madrid.